

4 . ありがとう (感謝の言葉)

1) Dankon! / Dankegon!

ありがとう / ほんとにありがとう!

2) Koran dankon! / Elkoran dankon! / Tutkoran dankon! / Multan dankon! / Mil dankojn!

どうもありがとう / どうもありがとうございます。

3) Mi dankas! / Mi tre dankas! / Mi tutkore dankas!

ありがとう / どうもありがとう / 心から感謝します。

4) Mi dankas vin! / Mi dankas al vi!

感謝します。

danki iun / danki al iu 「～に感謝する」もどちらの形も可。

5) Dankon pro ĉio!

何もかもありがとう。

6) Mi elkore vin dankas pro la helpo [servo].

ご援助[ご奉仕] 心から感謝します。

7) Mi tutkore dankas al vi pro via komplezo.

お心遣い、心から感謝します。

8) Koran dankon pro via afableco [bonkoreco]!

ご親切、ありがとうございます。

感謝の理由を表す前置詞は、por でもよいが、いまは pro が標準。

9) Vi estas tre afabla!

ご親切にどうも。

10) Kiel afabla vi estas!

何てご親切なんでしょう。

11) Dankon, sinjor(in)o, mi estas tre ĝoja!

ありがとうございます、とてもうれしいです。

sinjorino/sinjoro を添えると、丁寧になる。

2. Kioma horo estas? 何時ですか

1) Kioma horo nun estas?

いま何時ですか。

2) Estas ĝuste la unua kaj duono posttagmeze.

ちょうど午後1時半です。

3) La dua kaj dudek laŭ mia horloĝo.

私の時計では、2時20分です。

4) Diru al mi la precizan horon.

正確な時間を教えてください。

時刻・日付・名前・電話番号など、一言二言いっただけで教えられるものを「教える」のは diri でよい。instrui「教える、教授する」は大げさすぎる。

5) Dek minutoj post la oka.

8時10分過ぎです。

6) Kvarono antaŭ la naŭa.

9時15分前です。

7) Ĉu via horloĝo estas ĝusta?

君の時計は合っているかい?

8) Via horloĝo iras iom frue.

君の時計は少し進んでいる。

9) Tiu murhorloĝo emas iomete malfruiĝi.

その掛け時計はほんの少し遅れぎみだ。

10) Je kioma horo komenciĝas la kurso?

講習会は何時に始まるの?

11) Je la sepa vespere.

夕方7時だ。

12) Kiom da horoj vi lernas?

何時間勉強するの?

13) Du horojn.

2時間です。

Aŭgusto 8月 Pacon en la mondo! 世界に平和を

— Jam estas aŭgusto. Aŭgusto estas la monato de UK, ĉu ne?

もう8月ですね。8月は世界エスペラント大会の月でしょう？

— Jes, ankaŭ ĉi-jare finiĝis UK kun kelkmiloj da partoprenantoj el ĉiu mondparto.

うん、今年も世界各地から数千人を集めて世界大会は終わったよ。

— Ĉu vi partoprenis en ĝi?

参加されたんですか。

— Jes. Ĝi estis tre sukcesa kongreso. Ĉe ĉiu partopreno en UK mi ĉiam pensas...⁽¹⁾

うん、大成功の大会だった。世界大会に参加するたびに思うんだ.....

— Pensas kion?⁽²⁾

思うって何を？

— Mi pensas, kiel grava estas la paco en la mondo.

世界に平和がいかに大切かって思うんだ。

— Kio pri UK pensigas vin subite pri tio?

世界大会の何が急にそんなことを思わせるんですか。

— Ĉar nur en pacaj cirkonstancoj ni ja povas kongresi en UK. Fakte en militaj jaroj esperantistoj ne povis kongresi. Oni povas diri, ke sukcesa UK estas kvazaŭ simbolo de la paco⁽³⁾.

平和な環境があってこそ世界大会が開けるからだ。実際、戦争中は大会が開けなかったんだ。成功した世界大会は平和の象徴だってとってもいい。